

Eŭropa Bulteno

Novembro 2007, № 10 (64)

De la redakcio...

Karaj legantoj,

Ĉi tiu numero de Eŭropa Bulteno plenas je diversaj vidpunktoj pri interkultura dialogo. Eble tio estas enkonduko en la 2008-an jaron, Eŭropan jaron de interkultura dialogo. Baldaŭ ni festos la Zamenhofan Tagon kaj ni proponas al vi kiel ĝin festi ĉi-jare.

Ankoraŭ estas tempo por skribi al Avo Frosto, vi certe faris multajn bonajn aferojn ĉi-jare, kaj mi esperas ke viaj deziroj estos plenumitaj. Adreso estas la sama (jam dum jarcentoj):

AVO FROSTO NORDA POLUSO HOH OHO KANADO - CANADA

(Mi aŭdis ke Avo Frosto kolektas poŝtmarkojn, do elektu iun interesan)



Krome, mi volas atentigi vin ke restis ankoraŭ tuta decembro por skribi artikolojn en Vikipedio por atingi 100 000 artikolojn ĝis la Novjaro.

"Vikipedio estas projekto por la konstruo de libera reta enciklopedio en multaj lingvoj. Ĉiu povas kontribui per sia scio. De novembro 2001 tiel estiĝis 91 499 artikoloj en la esperantlingva versio. Ek al 100 000. Kuraĝon al ĉiuj !"

Viaj kontribuoj estas bonvenaj. Jen la adreso:

<http://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88efpa%C4%9Do>

Se vi opinias ke en la Bulteno mankas via artikolo, bonvolu sendi ĝin kune kun fotoj.

Agrablan legadon kaj skribadon!

Vesna Obradović

MI SCIVOLEMAS, MI DEMANDAS, MI EKSCIAS....

En oktobro 2004 la unuan fojon mi eniris en Ĝangalo-babilejon. Mi ne tro lerte povis paroli Esperanton, sed mi ĉion komprenis. Tie mi trovis du personojn, Bert el Nederlando kaj Dmitri el Rusio. Ili estis unuaj personoj kun kiuj mi tie babilis. Sed la babilejo havis pli ol 2000 vizitantoj registritaj kaj proksimime 160 homojn kiuj regule babilis. Sufiĉe ofte ni estis de ĉiuj kontinentoj samtempe tie. Kompreneble ni babilis pri multaj diversaj aferoj, pri vetero, manĝaĵo, laboro, familioj, posedaĵoj, kutimoj, superstiĉoj. Ni amuziĝis tie, kaj sentis aliajn babilantojn kiel konatuloj, amikoj... Sed aspektas ke tiu babilejo havis apartajn periodojn kiam novaj homoj amasiĝis kaj kiam grupetoj forlasadis la babilejon por paroli pli private, eble uzante "skype", "msn", "google talk" kaj aliajn programojn kiuj ebligas diskutadon. Nu, ĝi estis bona loko por konatiĝi.

Mi jam menciis Dmitri. Ni babilis en la babilejo de 2004, sed ĉi-jare, januare, ni fine presone konatiĝis dum mia restado en Moskvo. Estis interesa renkontiĝo, ni multe parolis, estas tute alie paroli kun viva persono ol babili rete. Fine mi tute hazarde eksciis ke li ne estas moskovano, sed ke li travivis sian infanaĝon multe pli norde. Mi estis ege scivolema, mi multe demandis kaj multon eksciis. Nun mi povas pli bone kompreni la vivon en tiu fora parto de la mondo.

Iasence mi plenumis mian taskon rilate la Zamenhofan Tagon. Dezirante sukceson al vi, mi montras parteton de tiu ĉi inetera rakonto al vi.

"Kelkaj scias, ke mian infanaĝon mi pasigis en la plej norda urbo en la mondo. La urbo nomiĝas Dudinka kaj situas en duoninsulo Tajmirija ĉe la granda rivero Jenisej. Mia scivolema amikino petis min rakonti pri la vivo en tiu ekstrema loko, la Ekstrema Nordo.

Mi faru el tio serion da blogeroj. Jen estas la unua. Mi decidis komenci de vintro, ĉar ĝi estas la plej longa kaj malfacila sezono tie.

Mia familio venis tien en 1972, kiam mi estis dujaraĝa. Mi vizitis infanĝardenon kaj poste lernejon. Ĉiun someron mi pasigis ĉe miaj avinoj «en la kontinento» - tiu vorteto estas kutima tiuloke kaj signifas «ekster la Nordo». Post someraj ferioj ni revenadis aŭtune – la norda aŭtuno komencas frue kaj rapide pasas, anstataŭata per vintro.

Por norduloj longaj frostaj vintroj ne estas io eksterordinara - ni al kutimiĝis al frostego kaj mallumo de arktika nokto. Ordinara vintra temperaturo estas inter -25 kaj -35°C. Sed la aero tiuloke estas seka kaj pro tio la frostego ne tiom sentiĝas kiel en pli sudaj regionoj. Diferenco inter taga kaj nokta temperaturo apenaŭ ekzistas (nu, ĉu vi sentus diferencon, ekzemple, inter -35 kaj -37°? Pli gravas ventoforto - unu metro per sekundo aldonas 3 gradojn da frostego). Bonŝance, en Dudinka maloftas fortaj ventoj dum la frostego. Se ventas, la temperaturo plialtiĝas iom.

La neĝo abundas en vintro. Kutima vintra bildo: dumetraj neĝdunoj apud domaj muroj. La urbo situas en loko de multjare frostiĝinta tero, pro tio ĉiuj domoj staras sur palisegoj kaj ĉiuj tuboj kuŝas ne en la tero, sed sur tera supraĵo. Ĉar ne eblas fosi la frostiĝintan teron - pro enpenetro ĝi povus degeli. Do pro la palisegoj la unua etaĝo de la domoj ofte situas je alteco de 1.5-2 metroj super la tero. Tio oportunas, ĉar la neĝdunoj ne rajtas ŝtopi la enirejojn."

Pli multe pri la Vivo en Nordo vi povas legi ĉe <http://www.ipernity.com/home/dmych>

Vesna Obradović kaj Dmitri Brechalov

ZAMENHOFTAGO EN EŬROPO


Karaj geesperantistoj en Eŭropo! La estraro de EEU diskutis kiel festi la Zamenhoftagon kaj samtempe esti utilaj por niaj celoj en Eŭropa Unio. Tial ni proponas al eŭropaj landaj asocioj kaj unuopaj esperanto-societoj partopreni en komuna projekto INTERKULTURA DIALOGO PER ESPERANTO.

Per tiu projekto ni povos per nemulta engaĝiĝo atingi plurajn celojn:

1. Montri utilecon de Esperanto por celo eŭropa enkondukante tiel la eŭropan jaron de Interkultura dialogo

2. Per tio interesigi publikajn mediojn (ĵurnalojn, elektronikajn mediojn) por Esperanto kaj atingi publikecon

3. Fari interesajn esplorojn kaj konsciigi nin mem pri valoro kiun donas al ni Esperanto ebligante vivi en interkultura spaco.



Kion fari?

Ĉiu landa asocio, eĉ ĉiu societo, kiu tion kapablas kaj deziras, elektu iun ajn temon, pri kiu ĝi esploru pere de e-babilejoj, interkontaktado per interreto kun amikoj kaj e-konatoj tra la tuta mondo. Ekz. vi povas elekti la temon: kiel la homoj en diversaj landoj kaj mondopartoj manĝas? (kutimoj pri manĝado, manĝaĵoj, kuirmanieroj, kuirreceptoj, diversecoj kiujn esperantistoj de Azio aŭ Afriko rimarkis pri Eŭropanoj kaj inverse...). Tiun esploron vi faru dum deko da tagoj antaŭ la Zamenhoftago. Kolektu la informojn, faru raporton pri tio, konkludojn kaj kunvoku gazetarkonferencon okaze de Zamenhoftago, kie vi parolos pri interkultura vivo de Esperantistoj kiuj daŭre renkontiĝas kun homoj el aliaj kulturoj kaj reciproke interkonatiĝadas kaj dialogas. Vi prezentos ankaŭ la raporton pri via esploro kaj disdonos al la ĵurnalistoj skribitan materialon el kiu ili povos ĉerpi informojn por siaj artikoloj. Vi diros ke multaj aliaj esperantistoj faras same kaj ke eblas baldaŭ ricevi en interreto informojn pri multaj tiaj esploroj kaj ke ni tiel enkondukas Eŭropon en la eŭropan jaron de interkultura dialogo.

Alia grupo elektas ekzemple la temon: Kiel oni sin vestas? Kaj esploras kial la muzulmaninoj havas kapkovrilojn, kiajn ŝuojn havas laponoj kaj kial en Brazilo oni frostas che +10 gradoj kaj en Siberio oni komforte sentas sin che -15 C....

La tria grupo elektas la temon: kiajn festojn oni havas kaj okaze de kiuj gravaj datoj.....

Estas sennombro da eblaj temoj kiuj malkovros amason da etaj kaj gravaj informoj por pli bone komprebi la kulturajn diferencojn.

Ni petas vin informi la estraron de EEU se vi decidis partopreni en tiu ĉi projekto kaj per kiu temo, tiel ke ni eventuale iom kunordigu la aferon. Por EEU tre gravas ke aperu laŭeble multaj artikoloj en la gazetaro kaj ke vi sendu al ni kopiojn de ili, tiel ke ni poste uzu tion informante la Eŭropan Parlamenton.

Mi esperas pri amamsa subteno al tiu ĉi iniciato.

Zlatko Tišljar

INTERKULTURA DIALOGO EN MIA HEJMO

Kadre de la konferenco pri Interkultura dialogo kaj komunikado dum la ĉi-jara EEU kongreso en Maribor, ni multe aŭskultis pri nepra bezono de toleremo kaj komprenemo de aliaj homoj, landoj, kutimoj, lingvoj, kulturoj. Koni aliajn homojn por pli bone kompreni ilin estas bezonata afero, kaj devas esti parto de eduko de la infanaĝo. Ni ĉiuj konsentas. Ni ne kontraŭas, ni propravole lernas fremdajn lingvojn kaj instruas infanojn ke ĉiuj homoj estas apartaj, diversaj, kaj ke ni devas akcepti ilin tiajn kiaj ili estas. Ni akceptu iliajn kutimojn kaj kulturon, ni provu kompreni ilian lingvon, kaj ili faru la samon por paca kaj ĝua komuna vivo. Tiurilate ni faras diversajn projektojn kaj interŝanĝas vizitojn. Junuloj vojaĝas al aliaj landoj, homoj komunikas inter si kaj kunlaboras en multaj fakoj. Ni progresas. Sed ĉu ni vere progresas?

Kaj kio okazas hejme?

En la nuna tempo de modernaj komunikiloj ni - modernaj homoj - komuniĝas kun aliaj, kaj dank' al Esperanto amikiĝas kun multaj, kun kiuj ni antaŭ 30 jaroj malfacile kontaktus entute. Rete ni estas ligitaj per diversaj programoj, babilejoj...

Kaj poste ni interkonatiĝas. Kun grandega emo konatiĝi pli bone. Pro tiu emo, ni faras ĉion laŭeble plej bone laŭ la hejma eduko. Ni salutas plejeble afable, ni parolas decamaniere, ni faras amason da aferoj tute kompreneble kaj kun la plej bona intenco. Sed je tiu mikronivelo ni ne plu estas nur du kulturoj, ni estas du homoj kun du diversaj kulturoj. Pro interhoma rilato aperanta inter ni, ni strebas plifortigi la rilaton (ĉu vi jam enamiĝis esperante?). Ni provas kompreni unu la alian, ni provas fari tion kio estus akceptebla. Kaj en tiu strebo ni estas nur ni, simplaj homoj kun diversaj edukoj kaj diversaj kutimoj.

Kiam la aferoj funkcias, kaj ni estas bonhumoraj ni povas longe paroli pri kulturaj diferencoj, pri kutimoj, pri tio kio decas, kaj kio ne. Ni povas babili, ridi kaj ĝui la diversecon.

Sed vivaj homoj povas havi malbonan tagon, ne tro bonan humoron, kapdoloron kaj multajn aliajn malagrablojn. Tiam ni subkonscie bezonas ke iu traktu nin laŭ nia maniero, tiel kiel farus plimulto da niaj familianoj kaj "samkluturanoj". Sed ni vivas kun homo kiu havas alian edukon, kiu laŭ la propra maniero klopodas konsoli, helpi... Kaj jen la problemo. En krizaj okazoj ni estas nur tio kio ni estas. Ni estas egoismaj kaj netoleremaj. Ni estas ksenofobaj. Eĉ rilate al tiuj homoj kiuj estas inter la plej gravaj en nia vivo, kaj kiujn ni klopodas kompreni maksimume. Kiam ni estas koleraj, ege koleraj, ni komencas blasfemi patrinlingve. Kio tiam okazas kun interkultura dialogo? (Timiagas min la penso ke la kolereco aŭ malbonhumoro je "makronivelo" povas konduki al militoj...) Kio pri komunikado?

Mi vere volus scii.

Esperanto estas bonega ilo por plifaciligi la interkulturan dialogon, eĉ en mia hejmo. Tio estas nia avantaĝo. Sed ni neniam povos kompreni aliajn kulturojn antaŭ ol ni ekinteresiĝos pri ilia kutima ĉiutaga vivo. Kulturo komenciĝas ĉe la matena (ĉu matena?) preparo de kafo (aux eble teo aŭ io alia). Kafon ja ĉiuj preparas "laŭ kutima maniero", sed reale temas pri dekoj (aŭ centoj, aŭ miloj) da manieroj. Kiel vi preparas la vian?



Vesna Obradović

LA 5-a EŬROPA SOCIA FORUMO OKAZOS EN MALMÖ INTER LA 17-a KAJ LA 21-a DE SEPTEMBRO 2008



ESF estas grandega internacia renkontiĝo, kiun partoprenas ĉiun fojon inter 30.000 kaj 60.000 personoj el la plej diversaj nacioj kaj etnoj. La interkomunikilo de la forumoj estas plej ofte la kvin grandaj eŭropaj lingvoj, malofte eblas uzi ankaŭ aliajn lingvojn (se tradukado estas disponebla), sed ĝenerale la angla estas la plej uzata lingvo.

En la forumoj ĝis nun Esperanto preskaŭ ne estis uzata. Mi pensas, ke esperantistoj devus tion ŝanĝi. Pro tio mi petas ĉiujn, kiuj sentas emon disvastigi la uzadon de Esperanto kaj estas pretaj aktiviĝi por tiu ĉi celo, pripensi kiel ni povus ĉeesti en la forumo en Malmö.

La eblecoj estas:

1. organizi seminarion pri la temoj de lingvouzado en internaciaj rilatoj, egalrajteco de lingvoj, la rolo de Esperanto ktp.

Proponi temojn kaj aliĝi eblas unuope aŭ per organizaĵo, sed por organizi seminarion estus pli bone, se kelkaj esperantistaj organizaĵoj kunlaboros, ĉar la partopreno ne estas senpaga.

Proponi temojn oni devas ĜIS LA FINO DE NOVEMBRO 2007!

2. En la forumo ankaŭ estas ebleco por aranĝi ekspozicion, disvastigi informo-materialojn ktp.

3. Eblos volontuliĝi pri tradukado en la forumo (Por tio la alvoko venos poste.)

Pluaj informoj troviĝas sur la hejmapaĝo: <http://www.esf2008.org/en/>

Veronika Heé

KIA LINGVA EGALRAJTECO?

Antaŭ kelkaj monatoj mi aŭdis en la Hungara Radio la sekvajn frazojn:

"Ni ne atendu, ke nia EU-konkurso estos sukcesa, se ni ne verkos ĝin en perfekta angla lingvo. Ni rajtas ĝin verki hungare, sed tiun tekston unue la oficistoj de EU tradukos anglan, kaj la koncerna komisiono vidos nur tiun - eble fuŝitan - tekston...)

Tiom pri la deklarita lingva egalrajteco en la Eŭropa Unio, kaj tiom pri la respekto al la laboro de EU-tradukistoj, cetere kaj pretere.

Almenaŭ en mia laborejo, la Eŭropa Revizora Kortumo, ne estas kutimo fuŝadi tradukojn, tion mi povas atesti. Tre kapabla brita kolego faras la necesajn elhungarigojn, kaj ni, hungaraj tradukistoj, helpas lin finkompreni ĉiujn nuancojn. Kaj temas pri dokumentoj efektive bezonataj, kiujn hungaraj instancoj verkis hungare.

Estas tamen vero ke inter niaj traduktaskoj ne estas petskriboj por unia monapogo, nur dokumentoj rilataj al esploroj de la Eŭropa Revizora Kortumo.

Istvan Ertl

PRIPENSOJ PRI LA REAGO DE SLOVENIA REGISTRARO AL INICIATO DE LA 7-A EEU-KONGRESO

En la suplemento de oktobra numero de Eŭropa Bulteno mi tralegis konkludan kongresan dokumenton adresitan al Slovena Registaro (SR) kaj la reagon, el kiu mi reliefigas la respondon al la kvina punkto. Mi citas tiun ĉi kvinan: “Rekomendu al la Eŭropa Komisiono ke ĝi konsideru rolon por Esperanto por plibonigi lingvolernadon ene de EU kadre de multlingvismo, kaj pli longtempe kiel ebla neŭtrala solvo de lingva demando en EU, pro la lastatempaj ĉiam pli oftaj oficialaj postuloj pri tio”.

Kion respondas SR? Ke ĝi rifuzas tion kaj sekve ne proponos al Eŭropa Konsilio (EK) “ke ĝi konsideru la rolon de Esperanto kiel eventuala neŭtrala (longperspektiva) solvo de lingva demando en EU”. Sed pro kio ĝi rifuzas la kvinan punkton? Ĉar “tio kontraŭas la bazan principon pri multlingveco de EU”.

Mi haltas ĉi tie por iomete cerbumi pri tiu ĉi elvokita kialo. SR rifuzas prezenti Esperanton kiel solvo por la lingva problemo de EU, ĉar tio kontraŭas multilingvecon. Oni scias ke multlingvismo tiel, kiel multkulturismo matricas EU-on. Do, SR komprenis la 5-an proponon de EEU-kongreso kiel minaco al lingvo-plurisma matrico de EU. Se oni konscias ke al simila propono la lingva komisionano de EU, s-ro Leonard Orban, simile reagis/as, oni devas sin demandi kio kaŭzas tiajn reagojn? Kutime esperantistoj ŝultrumas dirante ke politikistoj malice miskomprenas niajn bonajn intencojn. Eble. Tamen ni atentu pri nia kvina propono: “Rekomendu al la Eŭropa Komisiono ke ĝi konsideru rolon por Esperanto por plibonigi lingvolernadon ene de EU kadre de multlingvismo, kaj pli longtempe kiel ebla neŭtrala solvo de lingva demando en EU...” Kiel politikistoj komprenis tion ĉi? Tiel: instruigi Esperanton por anstataŭi eŭropajn lingvojn! Ĉu intenca miskompreno? Mi ne certas, tamen mi suspektas ke eĉ iuj, kiuj forte subtenas plurlingvecon ne sufiĉe konsciiĝis pri tio, ke nur postuli lingvan politikon de du-fremdlingvoj por eŭropcivitanoj ne baros la superregadon de unu lingvo, kiel okazas pli kaj pli al la angla. Kaj ke tio endanĝerigas la matricon de EU kaj disfaligos EU-on! Tamen tion diri pri SR ne eblas. Ĝia komunikado avertas pri tio ke “la principo de multlingveco ja ne koincidas ankaŭ kun la praktiko de reala superrego de la uzado de la angla kiel *lingua franca* en la organoj de EU, kaj ankaŭ en la lernejoj programoj de multnombraj ŝtatoj membroj, kiuj subtenas la instruadon de la angla kiel unua kaj ofte ununura fremda lingvo”.

Bedaurinde tio signifas nek la anglan nek Esperanton! Kiel eblas miksi Esperanton, neŭtralan lingvon, kaj la anglan, etnan lingvon? Nur pro tio ke tiuj politikistoj komprenis/as niajn proponojn pri Esperanto, kiel proponoj por anstataŭigi la naciajn lingvojn! Ĉu ni respondecas pri tia fuŝo? Verŝajne! Fakte ni pledante favore al la riĉeco de multlingvismo ne sufiĉe klare sukcesas komprenigi tion, ke nur per neŭtrala lingvo povos resti ĉu multlingvismo en EU ĉu EU mem. Kion fari?

Anstataŭ simple proponi Esperanton kiel neŭtrala solvo por lingva demando en EU, kial ne proponi Esperanton kiel komuna lingvo en la instancoj de EU kaj helplingvo por disvastigi ĉiujn eŭroplingvojn? Ĉiujn kaj ne nur la oficialajn. Nur neŭtrala lingvo kreas kondiĉojn por instrui proporcie ĉiujn eŭroplingvojn en ĉiuj eŭroplandoj. Sen ĝi nur la plej fortaj lingvoj estos instruataj, kaj el ili pli kaj pli la angla, kiel ja okazas malgrau la oficiala lingva politiko. Ne sufiĉas dekreti dulingvan politikon, necesas ŝanĝi la bazajn kondiĉojn por egale instrui ĉiujn lingvojn. Kaj tion ebligas nur neŭtrala lingvo.

Verŝajne tio postulus pli precizan proponon pri la instruado de la eŭropaj lingvoj (proporcie al la parolantaro) kaj eĉ eventuale pri neeviteblaj kostoj. Kaj ne plu plendi pri elspezo de EU rilate al interkompreniĝo. Se per komuna lingvo oni forigos tradukon kaj interpreton oni multe gajnos por instrui lingvojn. Nek evitendas nek plorindas, ĉar tio apartenas al la matrico de EU!

Luís Ladeira

EL LA PROTOKOLO DE LA SKYPE-KUNSIDO DE LA ESTRARO DE EEU DE OKTOBRO 2007

1. Decido pri kontrakto enlaborigi Maja Tiŝljar kiel teknika sekretario de EEU kaj finefektiviganto de la projekto »Alieco kiel valoro«

Estas konfirmata la decido de la skriba estrarkunsido okazinta la 28-an de septembro akcepti Maja Tiŝljar kiel teknikan sekretarion de EEU kaj finefektiviganton de la projekto »Alieco kiel valoro« por la periodo de 1-a de oktobro 2007 ĝis la 31-a de marto 2008 kun honoraria salajro de 1000 eŭroj monate.

2. Decido pri peto de subvencio baze de alvoko de EACEA

La estraro decidis transdoni peton (ellaboritan laborplanon de EEU) al EACEA

(Citizenship – Connecting people throughout Eŭrope (Action 2: Active civil society in Eŭrope) baze de la alvoko: Call for proposals EACEA 30/07: "Structural support for European public policy research organisations and for civil society organisations at European level" 2008-2009 por tiel certigi tutjaran financadon de kostoj de la propra oficejo kun unu profesia aganto.

La peton ellaboros Maja Tiŝljar kun helpo de la sekretario kaj ĝi estos transdonota ĝis la limdato en novembro.


La estraro opinias ke estas grava fakto prezenti EEU kiel organizaĵon kiu aktive influas Eŭropajn civitanojn al civitana aktiveco kaj agas por eŭropaj celoj.

3. Decido pri oficejo por EEU en Bruselo

La estraro unuanime decidis akcepti la oferton esploritan de la vicprezidantino Flory Witdoeckt por lui en Bruselo oficejon ekde la unua de januaro 2008 je 6 monatoj kontraŭ proksimume 350 eŭroj monate en kiu deĵoros nova teknika sekretario kaj komence laboros por finaranĝi ĉion necesan pri la projekto Alieco kiel valoro kaj samtempe plenumos teknikajn agadojn necesajn por efektiviĝo de la laborplano. Se estos akceptita nia peto pri subvencio por konstanta funkciado de la oficejo (kion ni scios fine de februaro), la oficejo funkcios ĝis la fino de 2008.

Zlatko Tiŝljar

LA 2-A MOSKVA LINGVA FESTIVALO



Ĉu vi scias, ke por abĥazoj sufiĉas 2 vokaloj ĉe 64 konsonantoj, ke en la albana lingvo estas verba modo admirativo, uzata por esprimi miregon aŭ ke en Islando estas leĝe malpermesite uzi familinomojn kaj pro tio islandaj geedzaj paroj havas problemojn en arabaj gastejoj? Pri ĉio tio kaj pri multo plia eksciis partoprenintoj de la dume nova por la rusia ĉefurbo internacia festivalo.

La 2-a Moskva Lingva Festivalo sukcese okazis la 28-an de oktobro 2007 en Moskva ŝtata industria universitato (MGIU). Iniciatinto kaj organizanto de la Festivalo jam la duan fojon estas la junulara esperanto-klubo "EK-MASI". La tuta laboro estis farita volontule.

Lingva Festivalo estas festo de lingva diverseco, kulturaj diferencoj, internacia amikeco kaj libera komunikado, kie lingvoj kaj nacioj estas egale

estimataj kaj interesaj. Lingvajn festivalojn en Rusio lanĉis antaŭ 12 jaroj Ĉuvasa Junulara Esperanto-Asocio kaj en Ĉeboksary ekde tiam ili okazadas seninterrompe. Jam la 7-an LF organizis ĉi-jare esperantistoj en Volgograd kaj pasintjare la 1-a LF okazis en Moskvo, Sankt-Peterburgo kaj Tiĥvin. Tradicie programo de la Festivalo enhavas prezentadojn de lingvoj, lingvajn teritoriojn, naciajn koncertajn elpaŝojn, lingvistikajn kvizojn, renkontojn kun interesaj homoj kaj majstro-klasojn.

Tiufoje dum la Moskva Festivalo estis prezentitaj pli ol 40 lingvoj – de la araba ĝis la japana, de la antikva greka ĝis Esperanto, de la angla ĝis la ĉerkesa. La Festivalo komenciĝis je la 11.30 per la Solena malfermo, dum kiu la lingvoprezentantoj invitadis la publikon al siaj lecionetoj; pludaŭris laboretose: sep 30-minutaj blokoj po 13-14 lingvaj prezentadoj samtempe, kaj finiĝis per duhora multnacia koncerto.

La koncerto iĝis inda krono de tiu ĉi eventoplena tago. Ĝin partoprenis ĉambra ĥoro de Moskva Energetika Instituto, Moskva lernejo de skotaj dancoj, muzika grupo "Munnharpa", kartvela danca ensemblo "Kavkasioni", infana danca lernejo-studio "Arabesk", dancantoj de Rusia federatio de kapoejro, danca studio ĉe Hindia ambasadejo kaj multaj aliaj rimarkindaj kantistoj, deklamistoj kaj dancistoj.

Pli ol 500 vizitintoj (studentoj, lernejoj, lingvistoj kaj instruistoj de superaj lernejoj, aŭtodidaktaj kaj simple interesiĝantoj) pasigis tagon en amika, krea etoso de komunaj interesoj pri lingvoj, kulturoj kaj nacioj, loĝantaj en nia lando kaj sur nia planedo.

Similajn festivalojn moskvaj esperantistoj planas okazigi ĉiujare dum lasta dimanĉo de oktobro, ĉiufoje ŝanĝante festivalejojn. Ĉiun sekvan jaron nia programo vastiĝos kaj riĉiĝos allogante pli kaj pli da partoprenantoj.

Ni kore bonvenigas ankaŭ eksterlandajn organizemulojn, lingvoprezentantojn, artistojn kaj gastojn!

Irina Gonĉarova

NOVAĴOJ EL UKRAJNIO

En la listo "ukrajnaj esperantistoj" lastatempe aperis kelkaj interesaj novaĵoj pri la E-agado en Ukrainio. Mi prezentas ilin mallonge.

- Vladimir Soroka okazigas buntan socian aktivadon, i.a. temas pri Internacia karavano "Interkulturo", pri la movado "Ruĝa libro de ukraina kulturo", partoprenas en librofoiroj.
- Eugeno Kovtonjuk (kiu prezidas Filantropan fonduson je la nomo de V. Jeroshenko "Espero") iniciatis la unuajn en Ukrainio specialajn moneronkajn marko-kuponojn, dediĉitajn al V. Jeroshenko kaj UkrEA.
- Proksimiĝas al la fino laboradoj pri eldono de la Granda E-ukrajna vortaro de V. Pacjurko.
- Dum la pasinta jaro estis finaranĝita por esti eldonita la lernolibro de M. Heller.
- Okazis kelkaj televidaj programoj pri E-o, kiujn partoprenis M. Lineckij kaj E. Slovaccevskaĵa.
- E-on oni devige instruas en Kievo en la liceo nr. 38 (la instruisto M. Lineckij) kaj en la lingvistika gimnazio (la instruisto S. Fedotova).
- urbaj E-kursoj funkciis en Kievo, Lucjk, Kharkiv, Odesa, Jalta k.a. La diversgradaj kursoj estis organizitaj dum la Internacia festivalo "Aroma Jalto" (V.Hordijenko, la 29.04- 9.05).
- la 29-30.06 en Ternopila nacia pedagogia universitato nomata V. Hnatjuk okazis scienca konferenco "Esperanto en la XXI jarcento: la stato kaj perspektivoj omaĝe al la 100-jara datreveno de la Esperanta lernolibro por ukrainoj de Miĥajlo Jurkov". Samtempe oni malfermis la E-ekspozicion en la regionografia muzeo.
- En Volinia nacia universitato oni havis specialan kurson de E-o el interlingvistika vidpunkto kaj lingvokulturologio lau la programo, konfirmita pere de la Profesora konsilio kaj eldonita en la universitata eldonejo (la instruisto N. Daniljuk).
- En la sama universitato la 4.-5.10 okazis publika prelego en Esperanto de la kontrolo-revizia administanto pri financoj de Konsilio de EU P. Branko kaj "ronda tablo" kun partopreno de ĵurnalistoj (interpretis N.Daniljuk).
- P.Branko prelegis en E-o kaj havis publikajn renkontĝojn ankaŭ en Kievo.

Andrej Grigorjevskij

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 26-an de novembro 2007.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Veronika Heé, Istvan Ertl, Luizo Ladeira, Andrej Grigorjevskij, Irina Gončarova, Dmitri Breĉalov kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu